

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 156
9. 9. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bel Köln, Germanlando.

Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldona
ala al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

John Pollen †.

En ET ni jam informis pri malapero de nia fervora angla kunbatalanto John Pollen. Dume ni eksciigis, ke la informo bedaŭrindege, estas prava. John Pollen jam ne plu vivas! En „British Esperantist“ nia samideano W. M. Page, Edinburgh, dediĉas jenan nekrologon al li:

Nia eminenta honora prezidanto, Kolonelo John Pollen, la mondkonata pioniro kaj propagandisto de Esperanto, mistere malaperis en la Insulo Manx, en la vespero de la 18a de junio. De tiam neni sciigis pri li ĝis la 22a de julio, kiam lia korpo troviĝis ĉe Auchencairn, malgranda vilaĝo sur la sudokcidenta bordo de Skotlando.

Oni povas supozi, ke nia amata samideano, kiu ĝis la fino estis bonhumora kaj, malgraŭ nebona sano, ĝoja, promenante apud la maro, akcidente enfalis, dronis kaj forportigis. Tiele forpasis unu el la plej ĉarmaj homoj, kiuj iam vivis; homo, kiu ne havis unu malamikon, kaj kiu posedis milojn da amikoj en ĉiuj landoj. Al liaj edzino kaj gefiloj kaj tuta parencaro ni esprimas nian tutkoran simpatian.

John Pollen naskiĝis en Irlando en 1848, kaj ricevis la gradon de LL D. ĉe la Universitato de Dublin. Li havis distingitan karieron kiel civilservisto en Hindujo. En tiu lando li plenumis la oficon de juĝisto kaj reprezentanto de la registaro en diversaj regionoj. Ĉie li provis kompreni la indigenan pensmanieron, kaj lia simpatia sintendo al la enloĝantoj gajnis al li, ĝis eksterordinara grado, iliajn estimojn kaj amon. Li lernis la enlandajn lingvojn kaj dialektojn kaj fariĝis oficiala interpretisto al la registaro, kiu ofte komisiis al li gravajn taskojn, kiujn li brile plenumis. Notinde, kiel politika oficisto, li kondukis kaj prizorgis dekkvin reprezentajn gastojn de la hinda imperio dum la kroniĝo de la Reĝo Eduardo VII., pro kio li ricevis specialan dankesprimon de la Ŝtata Sekretario. Oni memoras unu el la Hindaj Princoj, kiu ĉeestis kun li la Genevan kongreson en 1906. Lia konateco kun orientaj lingvoj vidiĝis en lia traduko el la persa de la fama verko de Omar Khayyam, kaj ankaŭ la „ŝosilo“ Hindustania-Esperanto, bedaŭrinde ankoraŭ nepresita, kiun li verkis. Li fariĝis sekretario de la East India Association.

En la fruaj tagoj de Esperanto en Britujo D-ro Pollen estis unu el la plej agemaj propa-



Kolonelo John Pollen.

gandistoj. Ofte du-tri foje en unu semajno li faris publikajn parolojn en apartaj urboj. Distanco tute ne malhelpis, kaj li afable respondis al ĉiu invito, tre ĝoja ke li povis fari ankoraŭ pluan servon por la movado, kiun li rigardis kiel tre gravan. Al tiu tasko li alportis multajn valorajn kapablojn; li estis sperta lingvisto; li multe vojaĝis kaj bone konis la mondon; li posedis simpatian kaj bonhumoron; kiam li parolis, li allogis la aŭskultantojn per sia evidenta sincereco kaj elvokis tiom da entuziasmo, ke li rapide gajnis por la movado multe da adeptoj el diversaj sociaj rondoj.

Ne nur en Britujo li propagandis. Dum sia vizito al la Oriento en 1907, kaj ankaŭ al Aŭstralazio, li ĉie entuziasme proklamis la evangelion

de Esperanto. Oni memoras, ke ofte li rakontis dum niaj kongresoj kaj sur publikaj parolejoj, ke li flirtigis la silkan verdan standardon, kiun li ĉiam portis dum siaj vojaĝoj sur ŝipoj kaj sur tero; ke sur la P. & O. ŝipo „Marmora“ li instigis la gedukajn moŝtojn de Connaught interesiĝi pri Esperanto kaj varbis la dukon esti patrono de ĉiuj ĝisnunaj britaj Esperanto-kongresoj; ke li portis la flagon al Cairo kaj flirtigis ĝin antaŭ la Sfinksa kaj al Jedita super la tombo de nia patrino Evo; kaj ke tra tuta Hindujo li publike parolis al interesataj amasoj; ĉar li asertis, ke la hindoj, kiuj mem spertis per Hindustania specon de Esperanto, rajtas simpatii kun la internacia lingvo.

Kiel la unua Prezidanto de B. E. A. li donis nekalkuleblajn servojn al Esperanto. Li estis unu el la „Trio por la Tria“, — la neforgesebla Kembriĝa kongreso, kaj tie ĉarmis ĉiujn samideanojn per sia afableco. Oni memoras, kiel en Dreseno kaj Antverpeno, vestita kiel orienta potenculo kun larĝa plumo en la ĉapelo, li eniris la balcambrojn kaj gajnis la ĉeestantaron per multaj afablaĵoj. Ĉiam, kiam li ĉeestis internacian kongreson en la lando ajn, ni sentis, ke li estas prezidanto kaj reprezentanto pri kiu oni povus fieri.

Kaj nun, ho ve, ni ne vidos lin plu. Sed ni povas ankoraŭ aŭdi la ebon de lia bonhumora ridado, la simpatiajn korusajn vortojn, kiujn li eldiris ofte al humilaj laborantoj por Esperanto en negravaj lokoj. Granda kiel estis la homo, li posedis la koron de infano, kaj vivis en simpla religia fido al la boneco de Dio. Kiom nun taŭgas la vortoj, kiujn li tre ofte deklamis al privataj rondoj de amikoj:

„Subiro suna kaj vespera stelo
Kaj klara vok' al mi!
Kaj kiam ekvojaĝos mi al celo,
Baraj, ne ĝemu vi;
Sed dorme mova tajd', por ŝaŭm' kaj sono
Tro plena, portu min;
Denove al senlima regiono
Turnante hejmen sin.
Krepusko kaj vespera sonorilo
Kaj poste mallumeco!
Sed enŝipiĝos mi sen maltrankvilo
Aŭ kora malgajeco;
Ĉar kvankam prefer ĉiun limon nian
Forportos min la maro,
Esperas vidi mi Piloton mian,
Irinte trans la la baro.“ W. M. P.

Honoron al lia memoro!

I-a Kongreso de Sovetlanda Esp. Unuiĝo.

La 19. julio okazis en Moskva la I-a Kongreso de S. E. U.

Alvenis delegitoj de ĉiuj plej agemaj kaj laborpovaj organizaĵoj, eĉ el malproksimaj Irkutsk, Vladivostok kaj Tiflis. La Prezidentaro enhavis s-ojn Drezen (Moskva), Rukovicin (Irkutsk) kaj Varankin (Tver); en sekretariejon estis elektataj s-oj Šaber (Vitebsk), Polakov (Moskva) kaj Ranca (Petrograd). La kongreson salutis multaj reprezentantoj de sociaj kaj ŝtataj institucioj kaj eksterlandaj komunistoj.

La kongreso plene aprobis la agadon de C. K. de S. E. U. kaj la bazon de sovetismo, sur kiu staras S. E. U. Vera unuanimeco regis dum la kongreso kaj oni devas konstati grandan signifon kaj fruktodonecon de ĝiaj laboroj.

La 22. julio okazis Esp. koncerto, kiu havis grandan sukceson. Estas notinde, ke la kongreso laboris en domo de politikaj elmigrantoj, kiuj tre interesiĝis pri Esperanto.

Šaber, sekr. de S. E. U.

Rim. de red.: Nur antaŭ kelkaj tagoj ricevinte la raporton ni bedaŭre ne povis ĝin publikigi pli frue.

VARBU ABONANTOJN!

Esperanto inter la transportlaboristoj.

Dimanĉon, la 26. aŭg. la „Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj“ okazigis en Rotterdam kunvenon de ĉiuspecaj transportlaboristoj. Tie oni preparolis la eblecon utiligi Esp. por la Internacia Transportlaborista Federacio (I. T. F., sidejo Amsterdam). I. a. paroladis s-ano Nathans, la 2. sekr. de la I. T. F. Fondiĝis la Nederlanda sekcio de Internacia Ligo de I. T. F.-anoj, kiu projektos Regularon, laborprogramon kaj kotizojn. Ĉiuspecaj transportlaboristoj turnu sin al H. J. Verschoof, Harmoniestraat 22, Hoek van Holland.

Abstinenca movado kaj Esperanto.

Finlanda Grandloĝio de I. O. G. T. (International Order of Goodtemplars) akceptis en sia dua jarkunveno en Vasa la 11. aŭg. sekvantan de frato H. Salokannel proponitan opiniesprimon:

„Finlanda Grandloĝio sciigas, ke ĝi rilatas simpatie al Esperantomovado konsiderante la komunan, neŭtralan kaj facile ellerneblan helplingvon kiel plej gravan rimedon por forigi la fronton de I. O. G. T. kaj konduki la abstinenc-laboron ĝis fina venko. La kunveno eldiris tian esperon, ke la Internacia Grandloĝio admonu la anojn de la Ordeno en tuta mondo ellerni Esper-

anton, uzi ĝin en sia korespondado kaj en siaj internaciaj kongresoj. Esperanto fariĝu kiel eble plej rapide oficiala internacia lingvo de ĉiuj loĝoj kaj venu al ĝenerala praktiko en la kongresoj.“

H. S., Laihia, Finl.

3-a Kongreso de „Sennacieca Asocio Tutmonda“ en Kassel (11.—15. Aŭg.).

Partoprenis proksimume 250 gekamaradoj, inter ili kamaradoj el Bulgarujo, Anglujo, Nederlando, Rusujo, Hungarujo, Rumanujo. Okazis i. a. parolado de k-do Nekrassov pri „Sennaciismo“, propaganda kunveno, dum kiu paroladis kamaradoj el la diversaj landoj.

Oni malakceptis la proponojn pri fondo de propagandaj sekcioj, sed aprobis la fondon de fakoj. Komunista frakcio de SAT estas fondita. Propono de la rusaj kamaradoj pri aliĝo al la 3-a Internacio estis malakceptata.

Pri ĉiuj proponoj al la Kongreso definitive decidis la tuta membraro per referendumo.

Specialaj kunvenoj estis aranĝitaj por kunistoj, sportuloj, naturamikoj, tipografistoj. Krom tio „Laborista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj“ havis Konferencon.

Noto de la Redakcio: Bedaŭrinde ni ne ricevis detalan raporton pri la SAT-kongreso. Pro tio nia legantaro devos kontentigi pri tiu komuna artikolo, kion ni ankaŭ nur nun ricevis laŭ peto al kunlaboranto al ni.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgitojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj scilgitoj) pri ĉiu novaĵo el la Bep. movado. Kondiĉoj: rapide, konclze, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Afriko.

Suda Rodezio.

Tute izolite laboras fervore por nia movado fino Edith Berry, ĉe la Agrikultura Ministerio de Rodezio.

Or-Bordo.

En Coomassie s-ano Hubert varbas por Esperanto.

Ameriko.

Brazilio.

Rio de Janeiro. S-o Georgo Bodin, direktoro de la „Nacia Kompanio de Eksplodaĵo je Sendangereco“, en Rio de Janeiro, komunikis al Brazilia Klubo „Esperanto“, ke ĝi decidis uzi ankaŭ Esperanton en sia komerca korespondado eksterlanden.

S-o José Moraes da Cunha Vasconcellos starigis seĝojn nomitan „Domo Esperanto“ por la konstruado de abelujoj kaj iliaj instaloi (Estrada de Santa Cruz, 115 — Rio de Janeiro).

Ĝi havas privilegion por la konstruado de speciala ujo por la fabrikado de mielo nomata „Esperanto“.

Fondiĝis en Porto Alegre, ĉefurbo de ŝtato Rio Grande do Sul, Esperanta grupo nomata „Gremio Esperantista Everardo Backheuser“, kies prezidanto estas marĝalo José Rafael Alves Azambuja, tre malnova Esperantisto.

Jamaiko.

La Esp. movado sur la insulo Jamaiko perdis gravan membron. Nia ŝtata nigra pioniro s-o H. G. Denniston en Montego Bay forlasis Jamaikon por translokiĝi al insulo Kubo.

Martiniko.

Sur tiu ĉi insulo izolite troviĝas en Fort de France fervora samideano s-o H. M. Florence, supera instruisto, kiu propagandas Esperanton.

Meksiko.

Tampico. La 12. aŭgusto la grupo aranĝis bone sukcesintan kampofeston kun kanto- kaj muzikprezentado, komuna tagmanĝo kaj danco por solenigi la unuan datrevenon de la grupfandiĝo. S-o E. E. Guerra faris paroladon en hispana lingvo.

B. W. I. St. Vincent-Insulo.

Malnova s-ano P. Broens post plurmonata ferio restado en Nederlando fine de aŭgusto riveluris al Kingstown, Bonan vojaĝon!

Insuloj Trinidad kaj Margarita.

Kiel oni skribas al ni, ankaŭ tie la nemultenombraj samideanoj helpas al la progreso de Esperanto. Rilatoj al eksterlandaj gesamideanoj estas dezirataj.

Kiel ni sciligas, oni projektas la fondon de libera federacio de Esperantistoj en Mez-Ameriko kaj la insularo. Preparojn gvidas s-o Denniston, nun en Camaquey, insulo Kubo.

Azio.

Georgio.

Laŭ invito de poŝtofciista unuigo en Tiflis s-o Andrejew faris paroladon pri Esp. Ĉeestis preskaŭ 500 personoj. Estas decidite, ke kurso tuj komenciĝu. Ankaŭ en aliaj lokoj estas vigla movado.

Ĥinujo.

Shanghai. La 10. junio okazis kunveno de flina Telegrafistaro Esp. S-oj Husucz kaj Cen Caŭ jin faris paroladojn pri la metodoj de meminstruado de Esp. ktp. Chengtiu. En la alinormala lernejo kurso senpaga por studentoj, gvidata de s-o C. S. Kau.

Pekin. En la Ĉau-jang-Universitato kurso sub gvidado de s-o San-lin. Krome okazis koncerto por fortigi la mon-fundon destinitan por la Esperanta kolegio, pri kies fondo oni decidis en kunveno de lastjara decembro. Regularo estas en preparado.

Kanton. Oni informas nin pri la fono de nova grupo reunuiganta la izolajn samideanojn.

Persujo.

En Enzell laboras s-ano Bogdano Hajrapetjan, en Reĉti s-ano Rebrik. La movado vigliĝas. Ŝajnas dezirinde fondi persan asocion por intensigi la propagandon.

Sirio.

En Beyrouth, tre aktive propagandas Esperanton estiminda s-ano Emiro Omar Khalid, profesoro.

Turkestano.

Reviviĝo de la movado en pluraj urboj. En Ĉarguj nova kurso.

Ĥropo.

Ĉeĥoslovakio.

Kiel konate okazis lastatempe oficiale aprobitaj kursoj de Esperanto en la ĉeĥoslovaka armeo. En Klatovy Kaporalo Ŝustr aranĝis tre efikan ekspozicion Esperantan kaj faris bonegan paroladon antaŭ invititaj soldatoj. La parolado estas diskonigita per garnizona kaj regimenta ordonoj. La kolonelo mem vizitis la ekspozicion kaj esprimis sian kontentecon pri la elmontrita. Oni povas gratuli pri tia larĝvideco.

Germanujo.

Esperanto Gruparo Berlino.

En la antaŭlasta monata kunveno, egipta samideano, Prof. Benŝahar el Alexandria, raportis pri sia vojaĝo kaj UEA ktp.

Antaŭ kaj post la kongreso aro da eksterlandaj gesamideanoj vizitis la gruparon.

La 21. aŭg. en la monata kunveno ĉeestis ges-oj Drummond el Aŭstralio kaj s-o Jalava el Helsinki, kiuj al ni interese parolis pri siaj landoj. Ankaŭ s-o Pankratz el Polujo raportis interese kiamaniere li en la pola parlamento batalis por Esperanto.

Poste el la kongresanaro s-oj Gebhardt, D-ro Hanauer, Ellersiek, Glück kaj f-ino Nickel detale raportis pri la XV-a.

La ĝisnuna prezidanto D-ro Burkhardt pro oficial laboroj devas rezigni la prezidantecon, oni en laborokunsido elektis s-on D-ron Glück, kiu akceptis.

Gazetoj.

Pri la XV-a en Nürnberg raportis:

Les Echos, Paris, 1. 8.; Dala-Demokraten, Falun, Sved., 18. 8.; Reichenberger Zeitung, Reichenberg, 17. 8.; Latwijas Sarg, Rige, 19., 21., 25. 8.; Rigasche Nachrichten, Riga, 16. 8.; Vorwärts, Reichenberg, 15. 8.; Die Neue Zeitung, Wien, 14. 7., 5. 7., 11., 18., 25. 8.; Klatovské Listy, Klatovech, 4., 11. 21. 8. La Province, Mons, 24. 8. Pri lasttempaj sukcesoj de Esp.

Voprosi aviacii, Kazanj, aŭg. Represo de aviad. artik. el ET pri helplingvo kaj Esp.

Die Ostschweiz, St. Gallen, 10. kaj 22. 8. Pri helplingvo kaj Esp.

Les Nouvelles, La Louvières, 25. 8. Pri lasttempaj sukcesoj de Esp.

Jugoslavenski Narod, Zagreb, 4., 16.—26. 8.

New Jersey Post, Town of Union, 11. kaj 28. 8. Kun disk. pri Esp.

En la itala gazetaro aperis artikoloj en 55 gazetoj de 18 lokoj.

Esperantotagoj en Budapeŝt.

La 20. kaj 21. oktobro okazos eksterordinara Ĝeneral-kunveno de la Hungarlanda Esp. Societo en Budapeŝt Komenc. la 20. sabate je la 5 h. en la Socia Muzeo (17 h.). Dimanĉo daŭrigo, samtempe propagandparoloj en la urbo kaj vespere koncerto. Amuzajaranĝantoj: Baghy kaj Kalocsay. Ĉiuj hungaraj Esperantistoj estas invitataj! Fremdaj gastoj plej korege akceptataj! Alvenon nepre anoncu baldaŭ. Adreso: VI, Eötvös utca 5, Budapeŝt, Hung.

La nova Eŭropo.

Nova statistiko. — 31 suverenaj ŝtatoj.

Postkiam nun la limoj de ĉiuj Eŭropaj ŝtatoj estas fiksitaj kaj la popolnombro de preskaŭ ĉiuj ŝtatoj ŝajnas okazinta, ebligas starigi statistikon pri la nova Eŭropo. Hodiaŭ nombras Eŭropo 442,5 milionojn da enloĝantoj kontraŭ 465,5 milonojn antaŭ la mondmilito, do evidentiĝas malpliĝo de la Eŭropa enloĝantaro je 23 milionoj. Ĉi sube sekvas, ordigitaj laŭ la alteco de sia popolnombro kaj montrato de la areo, la Eŭropaj ŝtatoj:

	kvkm.	enloĝantoj
1. Rusujo (Eŭropo)	4131 600	93185 000
2. Germanujo (inkl. Saar-teritorio)	470 890	59 859 000
3. Anglujo	244 000	44 518 000
4. Francujo	551 000	39 402 000
5. Italujo	312 500	38 856 000
6. Polujo	385 500	27 160 000
7. Hispanujo	506 700	21 503 000
8. Rumanujo	294 200	16 252 000
9. Ĉeĥoslovakio	140 500	15 602 000
10. Jugoslavio	249 000	12 017 000
11. Hungarujo	92 700	7 646 000
12. Belgujo	30 400	7 462 000
13. Nederlando	34 200	6 865 000
14. Aŭstrio	84 000	6 428 000
15. Portugalujo	91 900	6 399 000
16. Svedujo	448 300	5 954 000
17. Bulgarujo	105 200	4 861 000
18. Svisujo	41 500	3 880 000
19. Finlando	387 600	3 403 000
20. Danujo	44 400	3 289 000
21. Irlando („dominio“ al Britujo)	69 400	3 216 000
22. Grekujo	128 700	3 152 000
23. Norvegujo	323 800	2 650 000
24. Litovio	98 700	2 246 000
25. Latvio	65 800	1 864 000
26. Turkujo (Eŭropo)	24 000	1 500 000
27. Estonio	47 600	1 109 000
28. Albanio	30 800	890 000
29. Danzig (sub estreco de L. d. N.)	1 900	557 000
30. Luksemburgo	2 600	357 000
31. Islando (personal-unio al Danujo)	102 800	95 000

Alkalkulotaj estas ankoraŭ la malgrandŝtatoj: Fiume kun 65 000, Monako kun 25 000, San Marino kun 12 000, Liechtenstein kun 11 000 kaj Andorra kun 5 000 da enloĝantoj. Gibraltaro kaj Malta, montrantaj kune areon de 300 000 da kvkm. kaj nombrantaj entute 232 000 da enloĝantoj, estas Anglaj kolonioj; Rhodos estas sub itala protekto.

P. E. S., Bydgoszcz.

Socia Vivo.

Laboro kaj Industrio en Ĥinujo.

Lasttempaj disvolviĝoj en Ĥinujo atendigas al la laboraj kaj industriaj kondiĉoj en tiu lando. Estas malfacile akiri certajn informojn pri la faktoj de la situacio, kaj estas tial feliĉa cirkonstanco, ke la Internacia Labora Oficejo povas eldoni en la julinnumero de la Internacia Labora Revuo aŭtoritatan artikolon pri laboro kaj industrio en Ĥinujo, verkitan de s-o J. B. Taylor, Agantprezidanto de la Universitato de Pekin, kaj Fraŭlino W. T. Zung, laborantino por la Y. W. C. A. (Kristana Asocio de Junaj Virinoj) en Ĥinujo, kiu ĉeestis la Trian Internacian Laboran Konferencon kiel frata delegito.

Ĥinujo faras ankoraŭ la unuajn paŝojn de sia industria revolucio, sed la ŝanĝoj kunigitaj al la enkonduko de modernaj industriaj metodoj okazas pli kaj pli rapide, kaj tuj el la sociaj problemoj, kiuj ĉiam akompanas similajn transirojn, montriĝas laŭ akuta formo. Se la progreso industriiĝo daŭras, estas neeviteble, ke la vasteco kaj diverseco de la riĉaĵoj de Ĥinujo kaj la nombro kaj karaktero de ĝia popolo faros el tiu nacio unu el la precipaj faktoroj en la tutmonda industrio. La mondo ne povas do esti indiferenta al la industria disvolviĝo de tiu lando.

Tiu disvolviĝo ebris multe pli malrapida ol tiu de Japanujo. En Japanujo la registaro helpis kaj eĉ iniciatis novajn entreprenojn, kaj plene utiligis fremdajn spertulojn, ĝis iliaj japanaj helpantoj sufiĉe lernis por konduki mem la aferon. En Ĥinujo la registaro estis malinklina lasi libere la fremdan spertulon kaj tial malhelpis la teknikan progreson de la Ĥinaj Industriistoj.

La ĉefa Ĥina industrio, la kotonŝpinado, senfacile plivastiĝis dum la lastaj jaroj. Rapida progreso fariĝas ankaŭ en diversaj fakoj de la maŝin-industrio, en elektro-instalado, en farunmuelado, en preparado de ovo-produktaĵoj, en presado,

ole-elpremado, en manufakturo de cemento kaj en aliaj industriaj entreprenoj.

La laborkondiĉoj, en la malnovaj kaj en la novaj formoj de industrio, estas tre malsupre de la okcidenta nivelo. Virinoj kaj infanoj estas grandnombre okupataj en multe da laboroj, kaj la labortempo estas longa. En la teksindustrio multegaj el la laboristoj estas virinoj aŭ infanoj. Okjaraj infanoj laboras en la teksejoj, kaj ilia labortago estas la sama, kiel tiu de la plenaĝuloj. En la alumetfabrikejoj laboras multe da tre junaj knabetoj. 12-horaj vicoj estas kutimaj en la teksejoj, kaj en la silkŝpinoj en Ŝanĝajo labortagoj de 14 1/2 horoj estas tre ĝeneralaj. En la maŝin-industrioj la labortago estas ofte ĝis 14 aŭ eĉ 17 horoj.

Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Medicino.

Nova kuracilo kontraŭ malario.

Moskva „Pravda“ (N-o 152 de la 10. 7.) sciigas ĵenan mallongan telegramon: Saratov, la 8. 7. „Profesoro Ĉelincev eltrovis kontraŭmalarian rimedon, nomitan de li »Ciadia«. Eksperimentoj kun nova preparaĵo havigis bonajn rezultojn.“

R. L., Tallinn.

Tekniko.

Moderna ŝipkonstruo.

La amerikaj militŝipoj, speciale de la tipo movata per elektraj motoroj, inter ili la plej granda militŝipo de la mondo, la „Maryland“, estos superataj de la du, nun konstruataj, aeroplan-ŝipoj, kiuj post 1 1/2 jaroj estos pretaj por nova milito. Ili ne nur laŭ grandeco, sed ankaŭ laŭ rapideco kaj forto superos ĉiujn aliajn ŝipojn. Tiu du ŝipoj antaŭe estis decidataj fariĝi la krozoj „Saratoga“ kaj „Lexington“ sed la aliigo de la programo marista de Usono kaŭzis, ke tiuj du ŝipoj estos aranĝataj kiel naĝantaj havenoj por aeroplanoj.

La Usona militŝiparo ĝis nun posedas nur unu specimen de tiaj ŝipoj, nome la ŝipon „U. S. S. Langley“ kiu antaŭ ne longe faris la unuajn provojn. Ĝi estas nomita al honoro de s-o Langley, kiu faris la unuajn praktikajn studojn pri aeroplanoj. Tiu ŝipo estas ankaŭ la unua ŝipo por aeroplanoj, kiu estas movata per elektraj forto.

La du novekonstruataj ŝipoj povas esti nomataj „Kampoj de aeroplanoj“, tiom granda estos ilia supraĵo. Ili havos 180,000 HP kaj moviĝos per 4 helicoj, kiuj estas movigotaj per po 2 motoroj elektraj, de kiuj ĉiu havas 22,500 HP. Tio estas entute la sesobla forto, kiun povas produkti la grandaj maŝinoj de „Maryland“, unu el la plej rapidaj ŝipoj de nuntempo. La lasta nur havas 28,000 HP. por ĉiu akso.

La rapideco de tiuj ŝipoj estos ĉ. 33 nodoj, je 12,6 nodoj pli ol „Maryland“. Ili estos 850 futojn longaj kaj 150 futojn larĝaj. Ĉiu el tiuj du ŝipoj produktos tiom da elektraj forto, ke ĝi sufiĉus por la konsumo de urbo kun ĉ. 700 000 enloĝantoj. Malmulte da personoj povas kredi, ke tiuj ŝipoj mem foruzos tiun elektran forton, sed tamen ne restos io de ĝi superflua. Nature la plej granda parto de la elektraj forto estos uzata por movi la helicojn, kiuj donos al la ŝipo la rapidecon de 33 nodoj, tio estas 39 mejloj po horo. Oni facile komprenos, kiom da forto devos esti produktata en tiuj markoloj, kies korpoj havos pli ol 33 000 tunoj kaj tamen tiel rapide tratranĉos la akvon, eĉ dum ventega tempo. 16 kaldronoj, helital per oleo, liveros la vaporojn por 4 grupoj de turbinoj kaj elektraj generatoroj, kiuj ree movos la 8 motorojn de la 4 aksoj. Ĉiu el la turbinoj havas 40 000 KVA, 5000 V, kaj 1700 turniĝojn po minuto. La motoroj estas konektataj en serioj po du kaj pezas po 440 000 funtoj. Ilia alteco estas 15 futoj. La helicoj sin turnas 350 foje en la minuto. La tuta maŝinaro pezas 2100 tunojn. Krom la turbinoj por la moviga forto, ĉiu ŝipo posedas 6 turbinojn kaj generatorojn, kiuj liveras la necesan elektran fluon por la lumo, la ventiloj, maŝinoj ktp. La motoroj kaj dinamoj de tiuj ŝipoj estas krom ilia grandeco interesaj, ĉar ili estas la unuaj grandaj motoroj, kiuj estas ekipataj per la supraj-refreŝig-sistemo. Tiu sistemo estas la sama kiun oni uzas en la aŭtomobiloj, almenaŭ laŭ la principo.

Entute ili fariĝos potencaj helpiloj, kiuj povos fari ĉiujn riparojn de aeroplanoj sur la alta maro.

F. P. H. (Habanna).

La teknika utiligo de la tajdo.

Konata fakto estas, ke la energio de fluantaj akvomasoj estas potenca laborilo. Per la helpo de akvoradoj kaj speciale de turbinoj oni uzas la kinetikan (movan) energion de riveroj. Sed al tia eluzo de la tajdo (al- kaj refluoj de la maro) oni ĝis nun ne pensis serioze. Tamen se oni pripensas, kiaj grandaj akvomasoj estas konstante en maro, oni facile povas konvinkiĝi pri la greveco de tiu ĉi problemo.

La francaj teknikistoj Parenty kaj Vandamme prezentis sian tiurilatan projekton ĉe la Scienca Akademio en Paris. La esenco de tiu projekto

Teruraj tertremoj en Japanujo.

Dume Eŭropo suferegas sekve de la milito-sekvoj, venas ve-krioj pri

Terura tertremo en Japanujo.

La telegrafo komunikas:

Heidelberg (Germ.), 1. 9. Longdistanca tertremoj de ruina karaktero konstatis la sismografo de la observatorio sur Königsstuhl. La unuaj signoj alvenis je 4 h. 11 min. 20 sek., la longaj ondoj je 4 h. 42 min. 11 sek.; la plej granda forto estis konstatebla je 4 h. 56 min. 21 sek. La moviĝo de la sismografo daŭris pli ol 3 horojn. La tertrema loko troviĝas proksimume 9500 km de tie ĉi, verŝajne en Mezameriko, Kalifornio aŭ Japanujo. Laŭ la fortoco la tertremo estas komparebla al la katastrofo de Messina (Italujo).

Paris, 2. 9. La observatorio sur la Parko Saint Maux konstatis sismografe denovan fortan terskuiĝon en la sama direkto kiel hieraŭ.

London. Reuter-Agentejo konfirmas la observatorian konstatojn. Terura tertremo okazis en Japanujo. Domaĝegoj en multaj urboj. Oni taksas, ke tri milionoj da homoj perdis sian vivon. La telefonlinio Osaka—Tokio estas detruita. Alttajdo forportis tutan urboparton de Tokio. En Amansa kaj Jokosuka ne plu restis domo. La sankta iusulo Enoskima — somera libertemp-ejo — estas subakviĝinta. La vulkano sur la insulo Oskima elpuŝegas daŭre dikajn fumnubojn. Militistaj aeroplanoj forsenditaj por fari observojn devis refluigi pro neeblo de esploro pro la fumnuboj. Pluraj vulkanaj erupcias kaj eljetas grandegan laf-ardon. Fukagava, Senji, Asakusa, Kanda, Honde, Sitevaja, Atami, Gotemba kaj aliaj estas tute detruitaj. Tokio estas en flamoj. Detruigo de la gas-kondukilo akcelis la brulegdon. Preskaŭ ĉiuj lumturoj de la marbordo disfalis. Ĉiuj fervojoj komunikoj en distanco de 100 km ĉirkaŭ Tokio estas detruitaj.

La japana registaro kredeble transloĝiĝos al Osaka aŭ Kioto. Traktadoj pro helpo kaj livero de nutraĵoj tuj estas komencitaj kun ĥina registaro. Help-krozoj tuj forveturis Japanujon.

San Francisco. Oni telegrafas, ke Tokio ankoraŭ estas en flamoj. Vunditoj plenigas la

estas, ke oni kunpremigas aeron per la leviĝanta aŭ malleviĝanta marakvo, per la sufiĉe kunpremita aero oni movigas maŝinojn, produktas elektran fluan, kondukas ĝin en akumulatoron kaj poste uzas ĝin laŭplaĉe por lumigado aŭ por movigo de elektromotoroj.

Francaj sciencaj revuoj komunikis la skizon de la projekto. Tiuj skizoj estas ekstreme simplaj, eĉ por la nefakanoj kompreneblaj bildoj. La ĉefa parto estas granda betona kubo. La kubo havas kvadratajn tratanĉaĵojn laŭlarĝe kaj laŭsupre. La aperturoj de tiuj kanaloj estas ĉe la mara flanko. La tuta konstruaĵo funkcias kvazaŭ pumpilo. La marakvo ludas la rolon de la piŝto. La enfluanta akvo — en ĉiuj kanaloj — premas valoron kaj kunpremas aeron ĝis 2—3 atmosferoj. Ĉe la refluo la akvo refluas, ree farante mekanikan laboron. Komprenibile la ferbetona kubo devas esti tiel alta, kiel la diferenco inter al- kaj refluo, kaj la konstruaĵo estas des pli utila, ju pli granda estas tiu diferenco.

Ĉu la projekto iam realiĝos, ĉu tiu ĉi formo estos entute uzebla, estas ankoraŭ sekreto; sed ni ĉiokaze devas rekoni la gravecon de tiu ĉi ideo.

Josefo Major, Budapeŝt.

Aerveturado.

Rusujo.

Dekmilometra rondflugo. Nova alteca rekordo.

La 2. julio revenis al Moskva la partoprenintoj de granda rondflugo Moskva—Ĥarkov—Rostov sur Don—Beslan (monto Kazbek)—Tiflis—Baku—Aŝhabad—Taŝkent—Kazalinsk—Orenburg—Borisoglebsk—Moskva, kiu orliture estis enskribita en la historio de juna rusa aerveturado. La aviadistoj: estro de aviadistaj lernejoj Welling, komandanto de la aviadilaro de Respubliko Znamenskij, kunlaboranto Nikiforov kaj aeroplano-mekanikisto Gruniev traflugis la tutan 10567 kilometran vojdon dum 76 horoj 35 minutoj, plejparte direktante la aerplanon en alteco je 1000 m. Traflugante Kaŭkazan montaron ili supreniris je 4900 m, stariginte novan eŭropan rekordon por kunpasaĝera flugo. La aeroplano (Junkers 6—7), malgraŭ foresto de bone organizitaj aerbazoj, sukcesplene transflugis la vastajn sudrusajn stepojn, majestajn glacikovritajn montoĉenojn, Kaspian maron kaj sablajn dezertojn de Turkeŝtano, pruante siajn bonajn ecojn. La aviadistoj, inter ili Welling, studinta en eksterlando kaj partopreninto de du militoj, konata pro siaj antaŭaj flugoj Aŝhabad—Tiflis (2300 verstoj) kaj Moskva—Kiev—Moskva (3400 v.), sukcese plenumis sian taskon. Ili studesploris la vojdon por organizataj linioj de aertrafiko, samtempe inspektante la lokajn aviadistajn organizaĵojn.

Ne malpli sukcesa estis la propagandaj rezultoj de la flugo, okazinta dum la tutlanda libervola

stratojn. La akvokondukiloj estas detruitaj, kio malhelpas la estingon de la brulapo. Ankaŭ en Yokohama okazis alt-tajdo. Multaj ŝipoj malaperis. Arego da bambu-domoj brulas. Nur kvartalojn inter kanaloj ne atingis la fajro.

* * *

Japanujo estas malnova terirema teritorio. Ĝi lokiĝas sur granda, de nordo al sudo iranta fendigo de la supraĵo de la tergloblo, kiu estas markita per grandegaj marprofundoj kaj sinsekvaj ĉenoj de vulkanoj. La geografia scienco supozas laŭ sia sistema esploro de la tertremoj kaj vulkanaj fenomenoj, ke la tiam post tiam malmoliĝanta tersupraĵo formas terbulojn, kiajn oni post pluvo povas konstati laŭ malgranda mezuro sur kampa tero. Ĉe progresanta malmoliĝo la randoj de la terbuloj interŝoviĝas kaj kaŭzas ekskuojn je la supraĵo. Tion oni nomas tektonikaj tertremoj. La disfalo de tuta terbulajo aŭ de pli grandaj partoj kaŭzas la ŝanĝiĝojn de la tera supraĵo kiel ekz. mardelokiĝojn. Geologie nova disfalo estis la rompo de la Mediteraneo.

* * *

En la nomo de la tuta Esperantistaro ni esprimas al niaj japanaj amikoj la esprimon de nia profunda kunsento. Espereble niaj samideanoj suferis kiom plej eble malmulte.

Paris, 4. 9. Aludante al la japana katastrofo oni raportas pri kolosaj torentopluvegoj en la ĉirkaŭaĵo de Hongkong (Ĥinuĵo). Oni konstatis kelkajn ter-rompiĝojn. Ĉu viktimoj suferas oni ne sciigis.

Evidente en konekto al la tertremaj originoj la telegraf-agentejoj raportas pri grandaj domaĝoj sekve de tajdego, egaj ventegoj, dig-rompiĝoj je la bordo de la Norda Maro. Pluraj vaporŝipoj kaj velŝipoj subakviĝis. Aliaj perdis maristojn, forportitajn en la maron. Aro da ŝipoj devis reveni al Hamburg kaj Bremen pro perdo de mastoj, direktiloj ktp. La sama malbono estis konstatebla en la Kanalo de Norda al Baltika Maro.

kolekto por la konstruo de potenca aviadilaro: ekzemple, sole la Baku-a laboristaro kolektis sumon, sufiĉan por konstrui 11 aeroplanojn. Dum la tuta longa vojo, kiu estas vera triumfo por la bravaj aviadistoj, ili estis ovacie renkontataj de la grandaj popolamasoj.

Laŭ gazeto

„Sciigoj de Tutruslanda Centra Plenuma Komitato“ N-o 162 L. Lorentson, Tallinn.

Novaj aerlinioj en Rusujo.

La komitato de Ekstreorienta „Societo de la Amikoj de Aera Ŝiparo“ organizas aerlinion Ĉita—Vladivostok, funkciligotan per 4 aeroplanoj de sistemo Junkers. La daŭro de la vojaĝoj estas nur 14 horoj.

Same progresas la Norda Rusujo. Estas fondita tie akcia societo „Severoljot“, organizanta aertrafikon inter Arĥangelsk, Mezen, Peĉora, Ustj-Sisolsk, Ustjug, Kotlas, Vjatk, Vologda, Moskva kaj Petrograd. La organizo estas konfirmota de Arĥangelsk-a Ekonomia Soveto, kiu sendube akcelos la efektivigon de la entrepreno, gravega por la vasta teritorio de Nord-Orienta Rusujo.

Laŭ „Nakanune“.

De la Societo „Dobroljot“ estas projektataj jenaj linioj: Taŝkent—Vernij, Taŝkent—Baĥara—Ĥiva (ambaŭ en Turkeŝtano), en Ukrainio: Ĥarkov—Odesa—Konstantinopol kaj Ĥarkov—Kiev kaj tiu, kunliganta Kirgizan Respublikon kun la centro.

R. L., Tallinn.

Nova rekordo!

La Agentejo Reuter raportas, ke du amerikaj militistaj aviadistoj faris novan rekordon, restintaj aeroplane 37 horojn kaj 15 minutojn en la aero.

Foiroj kaj Ekspozicioj.

La Internacia Higiena Ekspozicio en Strasbour kaj Esperanto.

La Ĉeĥoslovaka Ministerio por Publika Higieno sciigis la Ĉeĥoslovakian Asocion Esperantistan, ke ĝi ricevis de grupo de diverslandaj samideanoj Esperante skribitan esprimon de kontento kaj danko, ke ili povis per helpo de kelkaj Esperantaj surskriboj almenaŭ parte kompreni la diversajn ekspoziciaĵojn en la ĉeĥoslovaka fako de la Internacia Higiena Ekspozicio en Strasbour. Ili petis ankaŭ, ke estu eldonata Esperanta gvidlibro tra la tuta ĉeĥoslovaka ekspozicio. — Jen ĝusta maniero, kiel subteni alilandan movadon Esperantistan!

Foiroj.

Leipzig. La 26. aŭgusto komenciĝis la foiro de Leipzig. Kiel oni raportas la komercistoj ne estas seniluziigitaj. La nuntempa malfavoriga situacio de Germanujo ja ne promesas grandajn sukcesojn. Entute tamen la nombro de la ekspozicianoj ne malpligrandiĝis. Forrestis tiuj, kiuj ne povis veni pro la okupacio en la teritorio de la Rhein kaj Ruhr.

Köln. La foira oficejo komunikas en sia oficiala organo, ke la jam de longe projektita foiro de Köln ne jam povis okazi pro la okupaciaj malhelpoj. Oni firme esperas tamen povi aranĝi la foiron ankoraŭ dum la kuranta jaro.

N. B.: Ambaŭ notoj estas disvastigindaj por praktika propagando.

Nekrologoj.

En Petrogrado mortis subite

Fraŭlino Ludmila Mader,

ŝatata Esperantistino. Tute ne rigardante malsaton, malvarmon kaj aliajn malojn ŝi ankaŭ dum mizeraj tempoj propagandis nian aferon. Nun ŝi foriris de tiu ĉi mondo, suferinte tro dum la lastaj monatoj. Nobla koro ĉesis bati. Eternan pacon al ŝi!

Petrograda gesamideano akompanis ŝian korpon al la tombejo. Ĉe la enterigo la konata rusa samideano Mikli faris Esp. paroladon.

M. A.

Mortis la 18. aŭgusto en sia 65-a jaro sekve de akcidento la vicdelegito en Aarhus, orajisto **S-o C. A. Etzerodt.**

La dana Esperantistaro perdis en li unu el siaj solidaj apogoj en la provincurboj.

De la unua komenco de la Esp. movado en Aarhus li aliĝis al Konversacia Esp. Klubo de Aarhus, kies sekretario li estis dum multaj jaroj, kaj ĉe la lasta elekto al C. D. E. L. li fariĝis estramembro de la reprezentantaro.

La multenombra ĉestantaro kaj la belega floramaso ĉe lia enterigo montris, kiel respektata kaj ŝatata li estis. La pastro nomis lin en sia parolado neordinare simpata homo, kiu neniam diris malbonon pri aliaj homoj kaj pri kiu neniam estis dirita malbona vorto.

Ĉe la tombo diris la lastan adiaŭon reprezentanto de I. O. G. T., kaj la delegito de U. E. A., s-o C. A. Hvorslev en la nomo de la Esperantistaro dankis la mortintan samideanon pro lia fidele laboro por nia lingvo. La klubo de Aarhus metis belan florkronon kun verdaj kaj blankaj rubandoj sur lian ĉerkon.

Li ripozu en paco!

Bibliografio.

Recenzoj.

Litova Almanako. Eldonis: Litova Esperanto Asocio, Kaunas, D. Vilniaus gvė. 84. 15x18 cm, 285 paĝoj, broŝurite, 3½ svis. frankoj.

Se io povas vidigi la praktikan utilon de Esperanto tiu ĉi libro estas bonega pruvilo. Sur 285 paĝoj ĝi informas en 22 div. ĉapitroj pri Litova arto kaj literaturo, pri lando kaj popolo, pri div. problemoj naciaj en Litovio, pri la historio de la lando kaj multaj historiaj datoj. — La libro estas tre impresiva, laŭtempe aranĝita; papero kaj presado tre bonaj, preseroj tre malmultaj. La lingvo estas tre klara, stilo flua. Nur kelkajn naciismojn mi rimarkas. Resume oni povas inde envicigi la libron inter la div. bonkvalitaj verkoj lasitempe aperintaj en Esperanto.

Por ET-abonantoj la libro estas akirebla de la administracio de ET kontraŭ depreno de respektiva nombro de ET-numeroj el la abon-konto.

Gazetoj.

Golden Age Esperantist, Box 225, City Hall Station NewYork. Nova grandformata propag. gazeto angla kaj Esp. Monata. 1 dolaro jare.

La Verda Lumo, Shanghai, majo—junio. Tre interesa gazeto de niaj ĥinaj samideanoj. Korespondemuloj povas legi en ĝi multajn ekstremajn adresojn.

Litova Stelo, Kaunas, aŭgusto.

La Suda Kruco, Melbourne.

Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 85, 25. 8.

Al niaj agentoj!

Por simpligi la mendojn de abonoj ni transsendis al ĉiuj niaj agentoj kvanton da novaj aboniloj, kiujn ili estonte bonvolu uzi. La abonilo estas presitaj sur maldika papero kaj povas esti kople skribitaj. Ni petas en ambaŭa intereso, ne plu fari iun escepton ĉe abonmendoj, ĉar tio komplikigus nian negocadon.

Administracio de ET.

Negocaj informoj.

Pro postaj malfacilaĵoj sekve de la okupaciaj malhelpoj ne estis eble al ni aldoni al la kompleta eldono de n-o 154 la aluditan prospekton pri la **Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana** de E. Wulster. La prospekto estas nun aldonata al la hodiaŭa numero. Denove menciante la gravecon de la vortaro ni petas niajn legantojn: **Atentu la prospekton!**

Al la klubestroj kaj kursgvidantoj!

Kiel la partoprenintoj de la kursgvidanta fakkenvenoj en Nürnberg devis konstati, la demando de la kursgvidado estas tro delikata kaj tro vasta, por povi ĝin bone pritrakti en nur du mallongaj kunsidoj kaj por povi fari tujan komunan, ĉiurilate sukcespromesantan decidon. Oni tial elektis en la dua kunsido (6. 8. 1923) jenan dupartian komisionon (vidu la rezolucion de la kursgvidantoj en „Esperanto Triumfonta“ n-o 151 b, 7. 8. 1923):

1. komisionon, kiu sin okupas pri la problemoj organizaĵe koncerne la kursgvidadon kaj

2. komisionon, kiu sin okupas pri la problemoj metodaj.

Tiuj-ĉi 2 komisionoj per helpo de la revivigita „Internacia Oficejo de Instruantoj“ havas la taskon interlali kun ĉiuj kursgvidantoj, kolekti la spertojn, faritajn dum la

kursgvidado kaj akcepti proponojn koncerne la kursgvidadon, por sciigi ilin al la tuta kursgvidantaro. Tiamaniere la interŝanĝo de la spertoj, proponoj kaj konsilioj koncerne la kursgvidadon fariĝos pli ĝenerala kaj pli fruktodona, kaj oni estos kapabla, baldaŭ starigi komunajn regulojn pri la plej bona maniero de la kursgvidado kaj instruado.

Por tiurilate jam preparlabori, mi petas ĉiujn klubestrojn k. a., ke ili plej baldaŭ anoncu al la „Internacia Oficejo de Instruantoj“ sub la adreso: Ĝenerala direktoro Henriko Fischer, București, Aleo Suter 19, Rumanlando:

1. Ĉu kaj kiom da kursoj ili malfermas en la venontaj monatoj,

2. la nomojn kaj adresojn de iliaj kursgvidantoj.

Plue mi petas ĉiujn kursgvidantojn kunlabori tiamaniere, ke ni helpu starigi kursan statistikon laŭ la instigo de s-o Degen el Leipzig.

S-o Degen proponas:

Ĉiu kursgvidanto en la nova jaro havu la devon de preciza ekstera ordo. Al ĉiu kurso apartenu malgranda kajero.

I. Sur la unuaj paĝetoj la gvidanto skribu kelkajn liniojn pri si mem, pri sia aĝo, sekso, profesio, siaj studoj, precipe lingvaj — ankaŭ Esper. — pri sia metodo, la uzataj lernolibroj ktp.

II. Sekvu listo de la kursanoj menciata: aĝon, sekson, profesion kaj la antaŭajn lingvo-studojn — eble ankaŭ la kaŭzojn kaj celon el kaj pro kiuj li-ŝi lernas Esperanton.

III. Sekvu la ĉiuleclona prikskribo: sur la unua linio: dato, horo, loko (elo)

• „dua“ : temo, materio ktp.

• „postaj“ : la memskribita listo de la ĉeestantoj.

IV. Post fino de la kurso, la gvidinto faru rimarkojn pri konvenaj, sukcesaj aŭ malhelpintaj cirkonstancoj kaj konfeson (sinceran) pri la sukceso aŭ malsukceso, pri siaj bontrafaĵoj aŭ eraroj, pri aliaj kaŭzoj de sukceso aŭ malsukceso precipe rilate al la lernantaro, lernolibro ktp.

Car nur la laboro IIIa, laŭ la nombro de la lecionoj, ripetigos kaj ĝi de la kursgvidanto postulos nur 2 liniojn, oni povas supozi, ke multaj el la kursgvidantoj ordeme aranĝos tian kajeron, el kiu lerta statistikisto (eble en la „Internacia Oficejo de Instruantoj“) povos elĉerpi multajn gravajn valorojn en ĉiu rilato (lernolibro, metodo, plej malfacila parto de la lingva sistemo ktp.)

Laŭ tia statistiko oni tiam pli solide bazite povos decidiri pri ĉiuj problemoj.

Mi ankoraŭ ĝustatempe sciigos al la kursgvidantaro la adreson, respektive kiu kolektos la supre menciitajn kajerojn, por starigi la statistikon.

Do helpu ĉiu kun plej bonaj fortoj kaj la rezultato estos vere fruktodona!

Emil Kreibich delegito de UEA. Kladno, Železářny, Bohemio.

Alvoko al raportistoj!

Mi konstatas la fakton, ke la London'a ĵurnalaro apenaŭ aludis la Rekordan Kongreson de Nürnberg. Mi pro tio petas ĉiun kongresanon superŝuti la redaktorojn de la London'a gazetaro per interesaj raportoj. *Chas. O. Stuart-Menteth.*

Germanaj Katolikoj!

Dum la kunsido de la Germana Ligo de la Internacia Unuiĝo Esperantista en Nürnberg, nia grupo estas elektita kiel kongresa preparloko de la Germana Ligo de la IKUE.

Ni petas ĉiujn samideanojn katolikajn, bonvole sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu sendi al ili la komunikojn de nia ligo.

La kotizo estas la kosto de afranko de eksteralanda letero por kvaronjaro. Kotizojn sendu al Postscheckkonto Breslau 54949, Eduard Pankalla, Breslau. Alĝojn bonvolu indiki sur la kupono.

Katolika Esperanto Societo „Unueco“ Alfred Hanuschke, prez.

Bohema Esp. Servo

informa, eldona kaj librila entrepreno dezirante kiel eble plej bone kaj rapide servi al la samideanoj

TRANSLOGIĜIS AL PRAHA.

Bonvolu do ĉiujn leterojn kaj mendojn direkti al BOHEMA ESPERANTO SERVO

:: Praha II, Žitná 44, Ĉeĥoslovakujo. ::

Eŭropo ĉe la abismo

de Francesco Nitti

lama ministrara prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.



Petu prospektajn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

Frankf. Societäts-Druckerei G.m.b.H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.

Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

Fervendistoj ! Ferfabrikejoj !

Kiu bezonas ilojn kaj maŝinojn por la prilaborado de metaloj ?

Malmultekoste kaj bone!

Bonvolu peti informojn de

Walter Freygang, Weinböhma i. Sa.

Fumu

La Esperanto - Cigaredojn

„Tutmonda Esperanto“

„La verda stelo“.

Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.)

Anoncetoj.

EDZIĜO. S-o Balyš Raugas kun f-ino Elena Avtukaitė en Rokiškis (Litovujo). [1]

UNUARANGAJN VINOJN de Rejno kaj Moselo, ankaŭ ŝaumajn vinojn vi aĉetas profitige ĉe: Altenkirch—Eccardt Nachf., Mainz. Reprezentanto: Peter Becker, del. de U. E. A. en Mainz (Germ.) Augustinerstr. 58. [3]

KOMERCANTOJ ĉiulandaĵ! Vi povos disvastigi viajn komercajn aferojn, plenumi viajn legalajn kaj komercajn praktikojn, koncedi reprezentadojn kaj ĉiuspezajn tenelojn favorajn al vi. Plej bonajn kondiĉojn por la samideanoj. Skribu tuj al la Civila kaj Komercia leĝoĉambro ĉe la advokato kaj prokuroro Arturo Scatà. Via Cavour 59, en Siracusa (Ital.). Oni korespondas en itala, franca kaj Esperanta lingvoj. [1]

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO, La Vostokov au faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo. [6]

KELKSEMĀJNAN RESTADON ĉe klera familio en Svisujo, Italujo aŭ Francujo, ev. ankaŭ en alia lando deziras samideano (germanino el Ĉeĥoslovakio, edzino de kuracis.o). Eventuale ŝi rekompenca gastigus post la reveno dum kelkaj semajnoj knabinon. Detalajn sciigojn oni bonvolu direkti al Komercia Instituto „Esperanto“ en Jägerndorf, Ĉeĥoslovakio. [1]

DANA AŬTORO (s-o C. Jacobi, „Bäckehuset“, Holbaek, Danujo), kiu interesiĝas pri klerigo de laboristoj, ekinteresiĝis ankaŭ por Esperanto kaj pripensas ĝin enkondukigi ĉe Laborista Vesperlernejo. Samideanoj, kiuj bone spertis pri E. Inter Laboristaro, bonvolu skribi informige al li — sen demandi lian respondon. Laborema Delegito. [1]

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ Yvert 1925. Gabriel Alomar, Prez. de EKP. str. Vallor, 14 en Palma de Mallorca (Hisp.) [1]

GERMANO 20-jara deziras iri eksterlanden. Oni skribu al E. Klotz, poste restant, Königsberg i. Pr. (Germ.) [1]

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Stasys Ozelis—Kazlauskas, en Rokiškis, Viežoji Aikštie 27 (Lit.) deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj pri nacia popolpecio; kantoj (melodio, teksto en nacia lingvo kaj laŭvorta traduko en Esperanto), dancoj, kutimoj ktp. Interŝanĝas il. pk. Filatelisto afranko direktita. [1]

Interŝanĝo de gvidlibroj. La Esperantista klubo en Praha I, Příklad 1, Edisaon, fondis kolekton de Esp-aj gvidlibroj. Tutmondaj samideanoj estas petataj, ke ili alsendu Esp-ajn gvidlibron de sia urbo aŭ lando (1—2 ekz.). Rekompenca ricevos ĉiu sendinto 20 paĝan luksan riĉe ilustritan Esp. gvidlibreton tra Praha, antaŭ la milito eldonitan. Laŭ la valoro de la sendaĵo ankaŭ pluraj ekzempleroj estas sendataj. [2]

Fr. Völker & Co., Mainz a. Rh. rekomendas sin je liverado de materialoj por elektra instalado. Bonvolu skribi al: Reprezentanto P. Becker, Delegito de U. E. A., Mainz a/Rh., Augustinerstr. 58. [2]

Samideanoj, por mono el altvalutaj landoj, sendita en enskr. letero mi sendas ĉiujn aperintajn kaj aperontajn germ. poŝtmarkojn. S-o W. Wittbrodt, Neukölln, Anzengruberstr. 3 (Germanl.). [2]

S-o R. Estko, Wilno, str. Ad. Mickienwicza 24—9 (Polujo) interŝanĝas polajn kaj rusajn car-markojn, nedifektajn kontraŭ alilandaj. [2]

Fraŭlo Erich Rudert, 19jara, Chemnitz, (Germ.), Lützowstr. 53, deziras interŝanĝi il. pk. k. ĉ. l. [2]

Fraŭlo Roberto Rosner, 21jara, Chemnitz, (Germ.), Lützowstrasse 27, deziras interŝanĝi il. pk. k. ĉ. l. [2]

S-o Leo Romppainen, Mikkelin Sanomat, Mikkelii (Finlando), deziras interŝanĝi pm. nur kun veraj f-istoj. [2]

F-ino Mario Schmultz, 26jara, Budapest (Hungarujo), 6, Fothi ut. 25-1-128, deziras interŝanĝi il. pk. k. ĉ. l. [2]

S-o Johann Wollschlager en Grossgmein (Salzburg-Aŭstrujo) deziras korespondadi per p. i. kaj l. kaj interŝanĝi pm. k. ĉ. l. [2]

F-ino Manjo Bastlova, Sl. Ostrava 955 (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝanĝi pk. bildfl. afrank. kun ĉiuj landoj. [3]

Car mi ricevis tiel multajn respondojn je mia anonco, mi ne povas respondi al ĉiuj. Pardonu min. Sigrid Carlén, Yxhult, Kumla (Svedujo). [2]

S-o M. Stein, Miedzzyrzec-Podlaski, Szkolna str. 16, (Polujo) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj (escepte Germanujo), donas Polujon, Danzigon, Palestinon kaj Sovet-Rusujon. [2]

Interŝanĝo de poŝtmarkoj pogrande (5-20 pecoj) de unu speco ankaŭ sur folioj kun ĉiuj landoj. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. Bazo Yoert, Senf ktp. S-o Jan Basil, Sl. Ostrava 955, Ĉeĥoslovakio. [3]

S-ro Edgardo van Gyseghem, Chaussée de Grammont 91, Erembodegem (apud Alost) Belgujo, instruisto-stud. deziras korespondi per ilustr. poŝtmarkoj (bfl.), papermono, kaj leteroj k. ĉ. l. (ankaŭ kun junaj fraŭlinoj). [2]

S-o Jozef Pěkný, en Kraków, Podgorz (Pol.) deziras korespondi per il. pk. kun samideanoj de la tuta mondo krom Aŭstrio. [2]

S-o Jakob Trzcinski en Bialystok, Piękna 7, (Pol.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun samideanoj de la tuta mondo, interŝanĝas ankaŭ papermonon. [2]

Mi deziras interŝanĝi il. pk. pm. kaj papermonon kun kolektantoj de la tuta mondo. S-o A. Wysocki, Rabinska 14, en Bialystok (Pol.). [2]

Oficisto de Berlin'a Esperanto-eldonejo deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj. Mi interŝanĝas pm., il. pk. kaj let. Max Gensen, en Berlin-Wilmersdorf, Detmolderstr. 55. [2]

S-ino Grasilda Vidutiene, Rokiškis (Litovujo) sendos 50 diversajn litovajn pm. kontraŭ nova franca, angla aŭ germana virinmodĵurnalo. [2]

Mi deziras korespondi kun samideanoj de la tuta mondo per pk. kaj let. Rob. Wachtel, Schlützenstr. 87, en Homberg a/Rh. (Germ.). [2]

Japana laboristo, 25-jara, deziras interŝanĝi vidaĵkartojn (bfl.) kaj leterojn kun seriozaj gekorespondantoj el ĉiuj landoj. K-do Eizo Saito, ĉe s-o Motoda, Abranokoli-Kujo, Kioto, (Japanujo). [2]

Fervojista Esperantista Sekcio de Oktobra fervojo (linio Petrograd—Moskvo) en Petrograd (Ruslando), str. Zingovka 62. Klubo je nomo de Lenin, serĉas seriozajn korespondantojn, precipe samprofesianojn. Temoj profesiaj, socialaj, politikaj, etnografiaj. Respondo kolektiva. Interŝanĝo de ĵurnaloj. [1]

S-ino Marie Martin, en Chemnitz i. Sa. (Germ.), André-str. 5 deziras korespondi kaj interŝanĝi propagandilojn. [1]

S-o Th. R. Sahlberg, Nya varvet, en Göteborg (Sved.) deziras korespondi kun f-inoj en Usono, kaj interŝanĝi fotografajojn. [1]

S-oj B. Hallin kaj J. L. Landin (I. O. G. T.-anoj) en Prästmon (Sved.) deziras interŝanĝi pm., il. pk. kaj leterojn kun ĉiuj landoj. La lasta interŝanĝas ankaŭ gazetojn Esperantajn. [1]

180 fervoregal novuloj de fondita grupo deziras interŝanĝi il. pk., pm. ktp. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo. Adreso: Ĝrupestro Leo Fiedler, Schillerstr. 15, III, en Breslau 15 (Germ.). [3]

Por 3 svisaj frankoj aŭ egalvaloro mi sendas 50 malsamajn pm. polajn, germanajn aŭ ĉeĥoslovakajn. Prof. L. Kronenberg, en Bydgoszcz, (Pol.). [1]

Mi korespondas kun la tuta mondo per il. pk. (naturvidajoj), interŝanĝas pm. kaj papermonon. Adreso: s-o Stan. Dzius, en Kielce (Pol.) Staro-Zagnanska 33, m. l. [3]

Malkaraj ilustritaj poŝtmarkoj unuakvalitaj riceveblaj ĉe prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz (Pol.). [1]

S-o Władysław Monarszynski, instruisto, Sarnowy, p. Kościerzyna (Pol.) serĉas seriozajn gekorespondantojn ĉiulande. (Ĉeftemoj: pedagogio, geografiaj kaj stenografiaj). [1]

Pograndaj komercistoj — fabrikantoj! Ofertoj dezirataj. H. Sjöding, vendisto de paperaĵoj kaj muzikaĵoj. Malm-skillnadsgatan 34, Stockholm. [2]

Policano en Svedujo deziras korespondadon kun amerikano (prefere kun policano). A. L. Hjelm, Kungsgatan 8, en Kristineham (Svedujo). [1]

S-ino Elizabeth Mitjakova, en Moskva, B. Dmitrovka 12, Esperantista klubo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. [1]

Ĉiulandaj samideanoj estas petataj sendi propagandilojn kaj Esp. sigelmarkojn al ĉefserĝento Alfred Uršin, ĉe la Prezidanto de la Respubliko Latvio, en Riga-Kastelo. Mi estas tre dankema al ĉiu sendinto. [1]

16-jara studento deziras korespondi per pk., interŝanĝi pm. kaj naciajn gazetojn ilustritajn kun tutmondaj samideanoj. Rudolf Ulbrich, Linz a, D., Tummelplatz 14 (Aŭstr.). [1]

Filatelistoj! Por 2 svis. fr. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz 1. Vgl., Bergstr. 5. [19]

S-o Paul Nikitin, en Moskvo, Kalančevskaja ploščadi, 1-f Krasnoprudskij per d. 1/2, kv. 7 deziras korespondi kun ĉiulandanoj pri libro- kaj gazetpresado; interŝanĝas pk. il. de arkitekturaĵoj, pejzaĝoj (bfl.). [1]

Prof. Miecz. Sygnarski, en Bydgoszcz, Kordeckiego 19 (Pol.) deziras korespondi per il. pk. (bfl.) aŭ leteroj pri komercaferoj. Interŝanĝas, aĉetas, vendas pm. kun la tuta mondo. [1]

S-o W. Rose, 70 Brockwood Lane, Welwyn Garden City (Angl.) volas korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj kun eksterlandaj ĝelernantoj (16—18 jaraĵ). [1]

Esperanta grupo deziras korespondi kun gesperantistoj de la tuta mondo. Skribu al s-o Paulö Renner, en Ober-Wülstegiersdorf i. Schl. 48 (Germ.). [2]

Kial ni vivas? kaj pri similaĵoj mi deziras korespondi kun la tuta mondo Eduard Augsten en Friedland i. B. 782 (Ĉeĥosl.) [1]

Bernardo Orlando, aktoro, en Stuttgart, Kriegsbergstr. 22 (Germ.), interŝanĝas pm. kun la tuta mondo. Kiu sendas 100—1000 sialandajn, ricevos saman kvanton de mia lando. [1]

S-o Otto W. Ferguson, Jeffersonville, Indiana (Usono), deziras interŝanĝi naciajn ĵurnalojn kun ĉiuj landoj escepte centraj eŭropaj. Li ne interŝanĝas pm. [1]

Samideano Rudolf Reeh, Trautenu, Kaiserstr. 5, Bohemujo, interŝanĝas, vendas kaj aĉetas pm. kun la tuta mondo. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. [1]

12 valorajn bildkartojn, montrantajn la morojn, kostumojn, kantojn de la germanoj sendas kontraŭ 2 sv. fk., 2 sv. kr., 1 guldo, 1/2 dol. aŭ samvaloro en registrita letero. Bruno Gahler, Trautenu, Anastasiusgrüngasse 3 (Ĉeĥosl.) [1]

Juna fraŭlino, poŝtfoficiŝtino, deziras korespondi poŝtkarte kun inteligentaj samideanoj de la tuta mondo. F-ino Karin Rosin en Söderhamm, Sved. [2]

S-o Fritz Schulze, Oststr. 155 en Göppersdorf b. Burgstätt (Germ.) deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. Mi respondas ĉiam kaj al ĉiuj. [1]

S-o Erwin Fiss, Bärenstein, Bez. Dresden, Schlossmühle (Germ.), deziras interŝanĝi pm., pk. kaj papermonon kun la tuta mondo. [1]

S-o Isaj Drauer, Warszawa, Muranowska 26/32 (Polujo), elsendas por 1 svis. fk. aŭ egalvaloro 15 sovjetajn kaj 10 polajn poŝtmarkojn. Ĉiuj bonkvalitaj, diversaj, nedifektaj. Ankaŭ interŝanĝas pm., pk. (bfl.) kaj korespondas. [1]

Kiu helpas al studento de hindustania lingvo per korespondado pri tiu lingvo kaj pri hindaj literaturo kaj popolokutimoj? Skribu, nomante ian ajn servon, kiam mi povos miavice fari, al s-o Reggie Hope, 753 Broadway W., Vancouver, B. C. Kanado. — Urdu-Zabán-Men-Likhiye. [1]

Bonkoraj Kuracistoj! Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj de spin-kurbiĝo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ la konsiloj de la tiaj kuracistoj mi portis gipskorseton dum 4 monatoj, sed sen utilo, ĉar laŭ mia opinio la kurbiĝo estas tre malsupre. Se iu el via scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas vin helpon al mi. Aleksander Parov, Miladinova 21, Rusĉuko (Bulg.) [1]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malkare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jasio (Pollando). Ni sendas pm.-elektajn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogrande; fuŝosendaĵoj malakceptataj. [3]

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peilboot III, Wilhelmshaven (Germ.). [2]

